Vi lernos, kaj praktikos

Prepozicio + kiu(j) + o(j)

1 En kiu botelo estas la ruĝa floro?
2 En kiu botelo estas la verda floro?
3 Sub kiuj tasoj sidas la blanka kaj nigra kato?
4 Super kiu domo flugas la grandaj birdoj?

5 Malantaŭ kiu domo staras la altaj arboj?
6 Dekstre de kiuj tasoj staras Ramono?
7 Maldekstre de kiu botelo estas Paŭlo?
8 Ĉirkaŭ kiu objekto la muŝoj flugas?

9 Apud kiuj objektoj troviĝas la glasoj?
10 Antaŭ kiu domo staras la malaltaj arboj?
11 Sur kiu monto la granda domo estas?
12 En kiu mano la muŝbatilo de Sinjoro Nopo estas?

13 En kiu kurso de Esperanto vi nun estas? BEKUNU aŭ BEKDU?
14 En kiu kurso de Esperanto vi baldaŭ estos?
15 Pri kiu temo nia instruisto de Esperanto parolis en la lasta leciono?
16 Sen kiu aĵo la instruisto ne povas skribi la vortojn de Esperanto?

17 En kiu urbo vi naskiĝis?
18 Sur kiu strato vi nun loĝas, kaj sur kiu antaŭ dek jaroj?
19 Bonvolu indiki al mi, en kiu konstruaĵo vi kaj mi estas nun.
20 Tra kiuj partoj de la urbo vi iros por iri hejmen post la hodiaŭa leciono?

21 Ĉu vi povas diri al mi, proksime de kiu urbo okazis la katastrofo de Ĉernobil?
22 Ĉu vi scias, tra kiuj landoj oni devas vojaĝi por iri de Hispanio ĝis Polio?
23 Diru al mi, en kiu urbo oni trovas la sidlokon de la Unuiĝintaj Nacioj.
24 Ĉu vi kapablas diri, tra kiuj landoj fluas la rivero Danubo?